

La Esperanto-Gironde Informilo

DECEMBRO 2020



N° 163

Ĉu viruson venkos vintro?



ĈU ESPERANTO POR ĈINA FILMO?

Reĝisoro bezonas nian helpon.



Vi bonvolu legi ĉi poste tradukon de telefon-interŝanĝo okazinta la 15an de septembro:

«Bonan tagon, mi nomiĝas Mikael Plunian kaj mi serĉas iun kapablan traduki tekston en Esperanton. Mi loĝas en Bordojo, kontaktis la kultur-centron de Palmer en Cenon, kies deĵorantino komunikis vian telefonnumeron.

- Nu, mi estas Marcelo Redulez kaj eklernis tiun lingvon antaŭ 47 jaroj.

- Jen mia bezono: mi laboras, kiel muzik-respondeculo por iu ĉina filmo, kies temo estas: kiel la Homo detruas sian planedon. La filmo fakte estas en tri partoj kaj nun ni preparas la duan pri nuklea danĝero. Bildoj jam estis filmitaj en Ukrainio, en Hiroŝimo, Fukuŝimo kaj aliaj mondregionoj, kie okazis atomkatastrofoj. Jam estas registritaj sonoj kaj dialogoj sed la ĉina aŭtoro pensas, ke la solista voĉo super la muziko povus legi (ĉu kanti?) sian tekston en Esperanto. Mi tute ne konas tiun lingvon. Tute ne scias, kiel ĝi sonas. Mi disponas pri la teksto en la franca kaj do serĉas iun, kiu bonvolus traduki ĝin, kaj viran registrotan voĉon. Jen mi povas legi al vi la tekston, kiu estas poezieca.

- Vi eble trafis taŭgan personon sed ĉu vi posedas ankaŭ la ĉinan originalaĵon? Kaj ĉu urĝas la afero?

- Jes kaj jes. Estus bone, se en la unuaj tagoj de oktobro, mi povus registri la voĉon.

- Do mi proponas al vi la jenon: unue vi rete sendas al mi la originalon kaj francan tradukon. Mi plusendos traduko-peton al ĉinaj esperantistoj. Mi fine de la semajno provos unuan malneton el la franca versio kaj ĝin sendos al poetaj geamikoj por kontrolo kaj korektoj. Ni nepre celu altkvaliton por tia projekto. La celo estu, ke ni havu taŭgan tekston fine de la monato por registrado de unua provo, komence de oktobro. Se necese poste eblos kontakti pli taŭgan teatrospertulon, mi pensas pri lokaj amikoj kun pli basa voĉo ol la mia, aŭ eĉ profesion muzikiston/kantiston, kiu loĝas en Le Mans.

- Jen ideala respondo. Mi tuj sendos al vi ambaŭ versiojn de la teksto. Tamen estu klare, ke la reĝisora aŭtoro fine eble rezignos pri tiu Esperanto-flanko.

- Mi bone komprenis, sed se ni ne preparas ĝin, ĝi eĉ ne povos iel ekzisti. Do ek!»

Ricevinte la retmesaĝon, mi sendis peton pri traduko el la ĉina al nia amiko Trigo (Sro Peng) en Wuhan sed ankaŭ al Bruno Henry kaj Laurent Vignaud, kies edzinoj estas ĉinaj. Bruno jam proponis plusendi la peton al la ĉina esperantista poeto Mao Zifu.

Sekve la mia promeso al Mikael Plunian mi verkis malneton pri traduko de la franclingva versio de la filmoteksto kaj sendis ĝin al niaj kutimaj kunlaborantoj, vokante kritikojn kaj modifoproponojn cele al plibonigo de la fina registrita teksto.

Esperantistoj estas mirindaj homoj!

Vendredon la 18an de septembro je la 09:37, Bruno petas tradukon de Mao Zifu, poeto publikiganta i.a. en *La KancerKliniko*. Unu horon poste (jes ja la saman tagon je la 10:35 precize) Mao sendas sian version.



Al nia amiko Trigo (Sro Peng el Wuhan) estas petite kompari la du versiojn: tiun el la originalo kun tiu el la franca. Responde li sendas propran tradukon.

Siaflanke Laurent Vignaud kontaktis unue sian edzinon sed ankaŭ Wang Chongfang, famkonata de la ĉinaj esperantistoj, ĉar li verkis i.a. vortaron *Ĉina-Esperanto / Esperanto-Ĉina*. Kaj la 21an de septembro je la 7a horo matene atingis nin la ĉi postan juvelon, kiun komuna aprobo taksas kiel la filman version.



Wang Chongfang

Ricevinte tiun tekston Mikael Plunian sincere entuziasmiĝis kaj kiel eble plej rapide deziris aŭdi kaj registri ĝian unuan provaĵon por mem konstati la muzikecon de la lingvo.

La registrado de la legado okazis mardon, la 13an de oktobro en mia oficejo en kuirejgo de Floirac. Tiu unua renkonto estis tuj kamaradeca.

Tiam mi eksciis iom pli pri la projekto. Temas pri ĉina produktado de filmotrilogio. Jam publikiĝis la unua lastan jaron. La dua filmo temas pri la homo, detruanto de sia natura medio. Kvar horoj da bildoj filmitaj en Fukuŝimo, Ĉernobilo kaj ĉe belorusa deponejo de radioaktivaj ruboj estas ĉe pariza muntisto. Kontrakte kun ARTE tiu ĉi dokumentar-filmo daŭros inter 90mn kaj 120mn. Mikael, bordoza artisto, kiu kutime partoprenas surstratajn aŭ vivantajn spektaklojn, ankaŭ akompanas por dancotrupo, estis elektita kiel muzikisto preparonta la sonbendon. Tiu ĉi estas jam plurlingva: ĉina, japana, ukraina kaj rusa. La ideo pri Esperanto kiel liga lingvo (ruĝa fadeno) fontas el la ĉina reĝisoro. Tamen ĉar neniu en la teamo konas ĝin, tiu provaĵo restas nur por konstati, ĉu vere kongruas la tuto en preparo.

Ĉar la unua legado registrado estas tro rapida, ĉar la poemo devas akompani pli longan scenon, mi relegas kaj la dua provo estas pli trafa. Mikael «enkestigis» la necesajon por defendi tiun projekton, konvinkita, ke Esperanto belsonas kaj tute kongruas por la filmo. Li nun devos konvinki ankaŭ la filmoteamon, kiu kunvenos en Parizo fine de oktobro.



La lasta diskuto parolas pri la eventualaj postaj agoj, se la pariza kunveno validos Esperanton. Tiam novaj tekstoj estos tradukendaj kaj registrendaj. Mi realudas pri la basaj voĉoj de ceteraj bordozaĵaj kamaradoj. Kaj Mikael petas la kontakton de Famo, ĉar vizitonte kelkajn tagojn poste familianojn en Bretonio, li volonte registrus la Faman voĉon survoje.

(Daŭrigota)

Marcelo, la 18an de oktobro

Aldona rimarko: De tiam estis provregistritaj la voĉoj de Bernardo kaj Yannick.



ANEKDOTO

Kutimo de la pasinteco en la bordoza regiono:

La alia julŝtupo: Kiam ni aŭdas la vorton «julŝtupo», ni tuj pensas pri tiu kuko en formo de ŝtupo, kiun ofte ni partigas kaj manĝas okaze de julfesta festeno.

Sed ni forgesis, ke sur kamparo de nia regiono «la julŝtupo» estis en la pasinteco vera ŝtupo el ligno, kiu grave rolis. Ĝi devis senĉese forbruliĝi dum ok tagoj en la kameno. Poste, oni preparis miksaĵon per ĝia cindro kun akvo, kiel trinkaĵon por brutaro. Popolkredo atribuis al tiu trinkaĵo kapablon konservi sanon al la brutaro.



Ĝojan feston al vi ĉiuj kaj ĉefe fartu bone!

Klodin'

LA INVENTINTO DE LA VINETIKEDOJ



Gaulon laŭ Goya

Litografion inventis Aloysius Senelfelder en Germanio en 1880. Sed tiu procedo konis aparte vastan aplikon en... Bordojo. Tie aperintan dank' al Eugène Cabillet en 1817 la litografian teknikon rapide adoptis Cyprien Gaulon, kiu instalas sin kiel presisto-litografisto sur la strato St-Rémi en 1818. Naskiĝinta en 1777 en Fort-Dauphin (St-Domingue), ekfakinstruisto pri kaligrafio, li forte impulsis litografion. Goya mem elektis la presejon Gaulon por eldoni siajn famajn kvar bildojn *Taŭroj de Bordojo* en novembro 1825. La pentristo desegnis la portreton de la presisto dankeme pro lia laboro.

La rolo de la entrepreno rapide graviĝis dank' al interveno en tute alia medio: la eldonado de etiketoj por vinboteloj. Komence ili estis nomataj *vinjetoj* (vignettes). Ĝis tiam la vinboteloj estis simple stampitaj aŭ markitaj per koloraj fadenoj. Tial eblas aserti, ke al Cyprien Gaulon ni ŝuldas tiun genian inventaĵon, kiu tutŝanĝis la manieron marki la vinon. La etiketoj enkondukis la eblecon aŭtentigi la devenon, originon de la vino, kreante komercan identecon por la altvaloraj vinoj.



La presejo Wetterwald postvenis tiun de Gaulon por eldoni etiketojn por la rumboteloj. Kelkaj restas plu famegaj.



Marcelo

LA MUELEJOJ DE COL-DES-ROCHES (LOCLE - JURASO)

Dum la kongreso de SAT-Amikaro en Métabief, en 2013, ni vizitis nekredoblan lokon en Ĵuraso, sub la gvidado de Mireille Grosjean. Mi serĉis sur Google la historion, tradukis artikolon en Esperanton - traduko korektita de la cenona grupo.

Bernard Weissbrodt, la verkinto de la ĉi-suba artikolo, estas svisa ĵurnalisto, kiu multe skribis tre interesajn artikolojn pri akvo sur retadreso: aqueduc.info.

Monique

El la notlibro de fama vojaĝinto:

«Ĝuste piede de la roko staras malgranda domo. Ho! Mi tiel klare vidas ĝin: tute blanka, kalkita, kun bluj fenestroframoj... Ni malsupreniras ŝtuparon ĝis ke-
loj. Tie troviĝas sakoj, kestoj plenaj je tritiko. Sube de niaj piedoj ni aŭdas bizaran gruntadon. Kelkajn ŝtupojn plu kaj tiel malhelas, ke ni devas fajrigi lampon. Nun ni troviĝas en akvomuelejo, subtera muelejo. Profunde sub la grundo muĝas torento; neniu supre suspektas tion. Akvo falas plurajn klaftojn sur bruajn radojn, kiuj rotacias kaj riskas tirŝiri niajn vestojn kaj kuntiri nin en sia turniĝo. La ŝtupoj, sur kiuj ni staras, estas eroditaj kaj malsekaj; el la ŝtonaj muroj la akvo fluetas, kaj tuj proksime, malfermiĝas abismo. Ho! Vi ja ŝatus tiun muelejon, samkiel mi ŝatus ĝin!»



Hans Christian Andersen, 1836

El Vojaĝoj en Svisio – Taglibro 1833-1873

* * *

En groto pli ol 20 metrojn profunda, jen tre longa historio pri subtera hidraŭlika sistemo, unika en Eŭropo, kiu iam funkciigis muelilojn kaj segilojn.

lom da historio:

Ekde la mezo de la 16a jarcento muelistoj el la valetto de Locle (pr. Lokl'), en la neŝatela montaro, nordokcidente de Svisio, elmontris grandan imagipovon kaj eĉ pli grandan aŭdacon, instalante – kore de vasta vertikala groto, en kiun tiam enfalis ĉiuj akvoj el la tiea baseno – serion da hidraŭlikaj radoj funkciigantaj muelilojn kaj batilon, kaj poste olepresilon kaj segmaŝinon.


Klarigcele sekvas kelkaj gvidaj punktoj.

- Male al multaj valoj de la Ĵurasa montoĉeno, en tiu de *Locle*, fermita kaj ĉirkaŭ 8-kilometrojn longa, ne mankas akvo. Ĝia baseno proviziĝas je akvo per pluraj fontoj kaj rojoj, kies akvoj alfluas al rivero *Bied*. Ĝis la komenco de la 19a jarcento, tiu rivero *Bied* malaperis en unu sola enfluejo, nomata *l'empoisieu* aŭ natura liko de la *Col-des-Roches – Pasejo de la Rokoj* (iam nomita *Cul-des-Roches – Pugtruo de la Rokoj*); sekve ĝi verŝiĝis centon da metroj suben en la francan valon de la rivero *Doubs*, aliflanke de la roka vando.

- Ĉar la topografio de la valo apenaŭ taŭgis por instali muelejojn, trafis kelkajn pionirojn la ideo konstrui ilin interne mem de la ĉefa groto, por profiti de la akvofalo alta je pluraj metroj. En 1549 la regiona senjoro konsentas koncesion, kiu stampas la komencon de longa, peripetiplena historio.

- La unua precipa rolulo en tiu historio, *Jonas Sandoz*, aperas unu jarcenton poste. En 1660 li fariĝas proprietulo de la malsupra fluejo de la rivereto *Bied* kaj tuj transformas la lokon *Col-des-Roches* en veran subteran entreprenon. Per la tiamaj rimedoj kaj iloj, li grandfare sukcesas aranĝi plurajn etaĝojn en la groto, kun rudimentaj galerioj kaj ŝtuparoj, ŝaktoj kaj defluiloj por provizi plurajn radojn, muellojn kaj segmaŝinon.

- Okaze de flualtiĝo tiu natura liko ne sufiĉis por forfluigi la akvon. Tiam formiĝis lago, la fundo de la valo inundiĝis kaj la subteraj instalaĵoj riskis gravajn damaĝojn. De post 1805 la situacio pliboniĝas dank'al borado de ellasa kanalo sub *Col des Roches* kaj aranĝo de malgrandaj kluzoj, ebligantaj reguligon de la flukvanto direkte al la muelejoj.



- *Col des Roches* eniris la industrian epokon meze de la 19a jarcento, ĝuste kiam la muelejoj ekkadukiĝis pro alveno de turbinoj. La nova proprietulo de la loko, *Jean-Georges Eberlé*, cetera precipa rolulo, decidis starigi vastan konstruaĵon (ankoraŭ videbla kaj nun gastiganta muzeon), en kiu li instaligas modernan farunejon. Ankaŭ la segejo estas remuntita ekster la groto. Samepoke estas tuj apude borita la tunelo, kiu fine ebligos trafikon inter Francio kaj Svisio, nepra kondiĉo por la disvolviĝo de la valo, antaŭ alveno de fervojo fine de la jarcento.

- En 1884 la municipo *Locle* sukcesas akiri la muelejojn kaj precipe la rilatajn priakvaj rajtojn. Tio ebligos ĝin efektivigi siajn projektojn salubrigi la marĉojn de la valo. Krome la subteraĵoj de *Col-des-Roches* utilis por la unuaj provoj pri hidraŭlika elektro. Fakte *Locle* fariĝos unu el la unuaj urboj en Svisio, ekipitaj per elektraj stratlampoj.

- En 1898 ĉelima buĉejo anstataŭas la muelejojn kaj utilas por sankontroli importitan brutaron. Rezultis gravaj konsekvencoj por la groto, ĉar ĝi fariĝis forfluejo por postlavaj akvoj kaj rubejo por buĉaj restaĵoj. Post fermo de la buĉejo en 1966, la lokon iomtempe okupas aŭtolavejo, kies malpuraj akvoj disfluas en la subteraĵojn, kiuj fariĝis kolektuoj por ĉiaj poluaĵoj.

- Nun la subteraj muelejoj de *Col-des-Roches* ja fascinas siajn multnombrajn vizitantojn (po ĉ. 35.000 jare). Sendube pro tio, ke same aŭdacaj kiel la unuaj muelistoj, manpleno da amatoraj historiistoj kaj speleologoj, rapide grupiĝintaj en asocio *Confrérie des meuniers du Col-des-Roches* (Gildo de la muelistoj de *Col-des-Roches*), decidis savi kaj restaŭri la lokon ekde 1973. Ne senpene, ĉar ekzemple, ne malpli ol 35.000 ĉarumplenoj da rubaĵoj estis eligitaj el la groto dum dekkvin jaroj da obstinaj klopodadoj kaj 55.000 horoj da libervola laboro. La loko remalfermiĝis por la publiko en 1987 kaj ĝia demonstra hidraŭlika sistemo nun estas provizita per fermita akvocirkvito. Krome la instalaĵon plivalorigas muzeo, kiu ebligas pli bone kompreni ĝian historian kaj teknikan cirkonstancaron.

Tradukita de Monique kaj la Cenona grupo



SOLVO DE LA ENIGMO DE LA NUMERO 162

La aŭtoro de la desegnoj, kiuj ilustras la broŝuron de Henriko Masson estas amiko de Christian Baudé (Kribo), la eldoninto. Jean-Seb Brilleaud, subskribinte JSB, jam malkaŝas sin sur la kovrilpaĝo! Kiel pli ol cent aliajn broŝurojn de la SAT-broŝurservo, vi povos libere elŝuti ĝin ĉe BitArkivo:

<https://mega.nz/#F!DsxnnCZI!NLIJz62gzFHRGutVE0KTsQ>

Marcelo

EL NIA MESAĜ-SKATOLO

Hamburgo, la 12-an de oktobro 2020

Karaj gesamideanoj

Kara s-ino Martine Edelbloude!

Mi reabonas LEGI, la Esperanto-Gironde Informilo pro la jaro 2021! Mi ŝatas la gazeton Legi kaj volonte mi legas la paperversion, do mi pagas per tiu letero 20,- Eurojn al vi.

Kaj salutas kore el Hamburgo.

Amike, ĝis baldaŭ

Via leganto de LEGI

Rainer Haupt

TOTALISMOJ

RIDO, LA UNUA MALAMIKO

Guillaume Erner, en Charlie-Hebdo n° 1475, 28an de oktobro 2020

Eĉ se tio ne estas ilia ĉefa manko, la islamistoj ne estas logikaj. Se ili vere defendus islamon, ili atakus tiujn, kiuj estas ties veraj malamiko, la rasistojn kaj la ĉiaspecajn hegemonistojn. Sed ĉu vi jam vidis iun ĝihadiston¹ publike malaprobi hatajn agadojn aŭ paroladojn? Kvazaŭ la faŝistaro ne ekzistus por ili. Anstataŭ tio, ili atakas tiajn demokratojn, nereligulojn kaj universalistojn, kiajn Samuel Paty, plej lastan viktimon. Eĉ pli precize, la islamistoj atakas ridon: plian fojon, tiun murdon motivis karikaturoj. Por tiuj murdistoj, jen maniero aliĝi al delonga tradicio.

La fanatikuloj hatas ridon. Ĉiujn el ili oni povas imagi ĉion ajn fari, escepte ridi. Iu mulao Omar, kiu ŝercas, same kiel iu Pol Pot, kiu petolaĉas, tio ne ekzistas. Tiu malamo venas de fore, en ĉiuj religioj, ĉu mistikaj, ĉu politikaj. Tiel oni ĝin eksplacite trovas en la regularo dekretita de sankta Benedikto. Tiu petas de la monaĥoj «ne diri vortojn vanajn aŭ nur ridcelajn, kaj ne ŝati ridon tro oftan aŭ tro bruon». Ĝi estas perfekte enscenigita en *La Nomo de la rozo* de Umberto Eco. En tiu detektiva enketo situanta en mezepoka kristanaro, raciista monaĥo batalas kontraŭ alia religiuo, fanatika, gardisto de la biblioteko kaj granda malestimulo de rido. Kial endas rifuzi ridon? Ĉar ĝi devojigas de la timo al Dio. Sekvas la volo forgesigi la penson de Aristotelo, laŭ kiu rido estas la propraĵo de homo. Cetere, dum multaj jarcentoj, kristanismo konsideris, ke la Kristo neniam ridis.



Frontpaĝo de Charlie Hebdo n° 1108, 11an de septembro 2013²

Kompreneble kristanismo ne estas la nura religia komunumo, kiu rifuzas ridadon. Ĉe Milan Kundera, ekzemple, la politikaj komisaraj estas senkompataj kun tiuj, kiuj sin dediĉas al tiu malvirto. Tio estas la kazo de Ludvik, rolulo de *La Ŝerco*, ekzekutita, ĉar li sendis al amikino kelkajn ŝercajn vortojn. Ĉar ironio ja prezentas veran danĝeron: ĝi estas la malo de unusececo kaj ebligas multoblan legadon de la realo. La duagradaj eldiroj postulas liberajn mensojn por ilin kompreni, kaj la tuta laboro de la totalistoj konsistas en tio, trudpeli homojn al laŭvortismo. Ĉion kompreni je la unua grado, la religiajn tekstojn same kiel la ordonojn de la partio. Esti fundamentista estas rifuzi la liberecon interpreti, trudante sencon unikan kaj originan. Kunridadi ebligas al la homoj interproksimiĝi. Provante nin timigi, ĉiuj fanatikuloj el la tuta mondo male strebas nin teni disigitaj. Jen kial kontraŭ ja rido kaj ne hato ili prefere batalas.

Tradukis Janine

¹ ĝihadisto: iu, kiu sekvas ĝihadismon.

ĝihadismo: politika kaj religia ideologio, kiu rekomendas uzadon de perforto cele al ekiĝo de Islama Ŝtato aŭ al restaŭrado de kalifejo.

²«Tedaĉas tiuj kunvenoj de gepatroj de lernantoj»



La kroniko de François Morel
Vendredon, la 20an de novembro
(<https://www.franceinter.fr/emissions/le-billet-de-francois-morel/le-billet-de-francois-morel-20-novembre-2020>)



*François Morel estas aktoro, humoristo,
kaj prezentas ĉiusemajnan kronikon ĉe France Inter*

LA AFERO DE LA KARIKATUROJ

La afero de la karikaturaj, kiu iam flamigis la mensojn, feliĉe nun apartenis al antikva historio.

Ĝi solviĝis aparte dank' al la malpermeso de insultaj karikaturaj. La karikaturaj kompreneble estis rajtigataj sed ili devis esti respektemaj.

Kelkaj rezistemuloj mokis tiun oksimoron, kiun ili taksis hipokrita. Iu respektema karikaturo, tio estis tiom kredebla, kiom iu tenera fatvo¹, iu ĉarma tero-risto, iu mojosa² senkapigo. Feliĉe la voĉo de racio estis aŭdita.

Charlie Hebdo, Le Canard Enchaîné kaj Siné Mensuel interalie povis plu aperi sed sub iuj kondiĉoj. La CRLS, *Comité de Régulation de la Liberté Satirique* (Komitato por Reguli la Satiran Liberecon), konsistanta el diversaj instituciaj komisiitoj kaj el reprezentantoj de la ĉefaj religioj, kontrolis la kompreneble senpripensan liberecon de tiuj simpatiaj artistoj: la gazetaraj desegnistoj.

Ĉiun jaron, en la Elizea palaco, estis organizata granda festo, dum kiu la Ŝtatestro, en senafekta etoso, venis saluti la karikaturistojn, skoldetante kun granda rideto tiun, kiu faris al li la nazon iom tro longa, tiun alian, kiu ekscese dikigis liajn brovojn.

La situacio tiam estus perfekte pacigita, se ne okazus tiu ondo da atencoj ligita al la minijupo, kiu, por iuj, estis konsiderata kiel neeltenebla insulto al ilia kredo kaj al ilia Dio.

¹ fatvo = «fatwa»

² mojosa: modern-junul-stila (por traduki ion, kian « super », « cool »... ĉi tie, ĝi tradukas « sympatoche »)

Multaj politikaj responsuloj, el maldekstro aŭ el dekstro, vigle engaĝiĝis por estingi la incendion kaj emfaze proponi la noción de kovrita senvesteco, de pudora seksallogeco. La minijupo tutplene rajtis esti surhavata en la publika sfero (kompreneble!... kiu estus sufiĉe freneza por ĝin malpermesi!) sed kondiĉe, ke ĝi estu surhavata klare sub la genuoj, ideale ĝis la ekstremaĵoj de la piedfingroj kiuj ne estis, kiam ili estis malkaŝitaj, kaj se vi estas ja honestaj vi konsentos pri tio, sen forte erotika efiko.

Kiam la plilongigita minijupo estis la nura vestaĵo akceptita por virinoj, oni kredis, malprave, ke la tempo de trankvileco estas alveninta. En mezlernejo Samuel Paty, skandalo eksplodis, kiam iu scienca kurso pri Charles Darwin estis interrompita de gelernantoj, kiuj, akompanataj de siaj gepatroj, taksis indigninda tion, ke la Respublika lernosistemo emfaze prezentas iun teorion, kiu kontraŭas tion, kion instruas al ili ilia prava kredo.

Multnombraj politikaj responsuloj (feliĉe, ili priatentis) vigle engaĝiĝis por klarigi, ke ne estas la momento pligravigi la situacion, ke oni povas perfekte paroli pri biologio, geologio, pri ĉio, kio rilatas al la vivuloj, la tero kaj la naturo sen devige elvoki la patron de darvinismo!

Plian fojon, oni laŭdis la ĝeneralan saĝon kaj ĉiu cetere agnoskis, ke la lerneja programo, jam sufiĉe peza, ne bezonas sin balasti per tiom dubindaj nocioj.

Tiel ĉesis tiu kroniko, provizore.

Tradukis Janine



Samuel Paty, fakintruisto pri historio, murdita kaj senkapigita la 16an de oktobro 2020 antaŭ sia mezlernejo en Conflans-Sainte-Honorine, en pariza regiono.



Brassens en esperanto Kampanjo 2021

PREZENTO DE LA PROJEKTO

En 2021 *Oĉjo Georges* estos honorata pro la centa datreveno de sia naskiĝo kaj kvardeka de sia morto. En Cenon, urbo apud Bordoza, kie troviĝas de kvindek jaroj sia sidejo, la loka Esperanto-asocio *Espéranto-Gironde* ekpreparas la eventon.

Oĉjo Georges verkis pli ol ducent kanzonojn. El tiuj almenaŭ 66 estis jam tradukitaj en Esperanton. Kelkaj en plurajn versiojn. Sub instiĝo de Marcelo Redulez, *Espéranto-Gironde* estigis novan defion: en 2021, eldoni ilustritan libron kun la kolektitaj kanzonoj de *Oĉjo Georges* en Esperanto!

Stariĝis redakta skipo, kiu aktive laboradas tiucele.

Gravan artistan apogon tiu projekto ricevas dank' al la aktiva partopreno de Blaise Guinin. Novbakita Esperantisto, Blaise aŭtoris la franclingvan bildrakonton *Georges et la mort* en 2011 kaj li konsentas ilustrati la libron.

Tiu presota libro estos dulingva. Troviĝos la originalaj tekstoj en la franca lingvo kaj fronte iliaj kanteblaj tradukoj en Esperanton. Ankaŭ eblos trovi agordojn por ludi gitaron.

Kiel tutsimple kunhelpi pri tiu presota libro?

Ĉu vi bonvolas sciigi la novaĵon al la membroj de via klubo aŭ asocio? Inter ili probable troviĝas interesotoj. Vi nombru la kvanton de promesoj de aĉeto kaj informu nin ĉe esperanto.gironde@free.fr.

La prezo de la libro dependas parte de la kvanto presota. Ni kalkulas la koston po maksimume 18€ kaj laŭeble malpli.

Amuzikajn antaŭdankojn,

Espéranto-Gironde



Brassens en esperanto Kampanjo 2021

PRI LE BLASON DE GEORGO BRASSENS

De nelonge, Marcelo Redulez', cele al eldono de libro pri kanteblaj esperantaj tradukoj el la repertuaro de Georgo Brassens, petis kontribuojn de kanzon-tradukemuloj por finpretigi plej grandan kvanton da titoloj. Nu, imagu ke li tion petis ankaŭ de mi, kvankam mi ne speciale kutimis traduki kanzonojn. Tamen, mi emis partopreni, ĉar ja Brassens mi sufiĉe ŝatas, kvankam mi ne tre ofte lin aŭskultas, preferante operojn kaj (malmodernan) ĵazon al variecaj kanzonoj... Ĉiokaze, mi malkovris, ke Brassens verkis ion, kiu nomiĝas *Le Blason* kaj blazono ĝuste estas fako, kiu multe interesas min. Mi do tuj interesiĝas pri tiu verko, kun celo ĝin traduki.

La unua konstato estas, ke literatura «*blason*» ne havas oficialan tradukon en Eo: temas pri poezia genro, kiu naskiĝis en Francio en la 16a jarcento, kun la difino, pli malpli ĝenerale akceptita: «mallonga poezia formo, kiu laŭdas partojn de l' virina korpo» paralele al la «*contre-blason*», kiu satire moktaksas tiujn partojn. Ĉefe rolis en tio Clément Marot, per siaj du poemoj pri mamoj: *Beau tétin* kaj *Laid tétin*...

La uzo de «*blason*» por ĉi poezia formo eble ŝuldiĝas al prunto de la heraldika vorto, kiu signifis unue pervorta priskribo de la ŝildo, kies ornamoj estis pli malpli rigardataj kiel la simbola portreto de la portanto. En prezentado de la turniraj kavaliroj, heroldoj laŭtis tiujn priskribojn, kiuj nemalofte estis verse redaktitaj. Sen ajna dubo, la privirinaj verkoj ne estis fremdaj al GB, kiu kun maliceto emis kompletigi la aferon, zorgante pri parto ĝis nun ne traktita, nome la virinan sekson, des pli volonte, ke li (ŝajne) povis profiti pri la dusenca franca vorteto trilatera, familiara kiam ĝi havas la signifon de «kreteno», sed aĉe slanga kiam temas pri la nomo de l' virina seksorgano.

La kanzono ricevis plurajn titolojn kaj plurajn variantojn, eĉ plurajn muzikojn - kiuj bone spegulas la malfacilon trovi kontentigan formon. En la unua formo en 1969, sub la titolo *Révérance parler (respektesprimo)* ĝi komenciĝis per:

*Imitant de Marot l'élégant badinage,
J'eusse aimé célébrer, sans être inconvenant
(De Marot imitante gracion la ŝercadon,
Mi emus festsoleni, restante respektema)*

Ĉe la dua verso (kiu aperis en ĉiuj versioj) oni aŭdas «sans être un con venant» (*sen esti venanta stultulo*).

La temo de la tuta kanzono ludas per la temo, ke ege 'stas bedaŭrinde, ke tiu tiel bela, nobla kaj paradiza virina parto suferas de tiu tiom aĉa nomo.

*Mais le pire de tous est un petit vocable
De trois lettres, pas plus, familier, coutumier,
Il est inexplicable, il est irrévocable,
Honte à celui-là qui l'employa le premier.*

*El ĉiuj, la plej aĉa 'stas tute eta vorto
Apenaŭ tri-litera, senĝena kaj kutima,
'stas ĝi neklarigebla, kaj eĉ nenuligebla,
Hontigu tiun, kiu l' unua ĝin vortumis!*

Tie GB «eraras» je du punktoj: la trilatera vorteto estas nek kutima nek neklarigebla!

Kutima: eble ĝi estis tia ĝis la komenco de la 20a jarcento, sed ĝi kvazaŭ kadukiĝis profite al la signifo de «senkapulo» post la Unua mondmilito. GB naskiĝis en 1925, do banis en kulturo, kiam la vorteto kvazaŭ komplete eksmodiĝis en la ĉiutaga lingvo, en ajna lingva nivelo, aŭ rare aperis por krei apartan efekton, ĝuste pro sia rareco: *Le con d'Irène* (Aragon 1928), *Le con d'Alice* (Pierre Perret, 1974).

Neklarigebla: male! laŭ etimologio, ĝi fontas rekte el la latina *Cunnus* (*ingo*), sen aĉa nuanco (nur la nuna aĉa nuanco ne estas plene klarigebla).

Fine, en la antaŭlasta strofo, GB esperas, ke iam iu eltrovos pli indan nomon por la laŭdata virin-ero:

*Fasse le ciel qu'un jour dans un trait de génie
Un poète inspiré, que Pégase soutient,
Donne, effaçant d'un coup des siècles d'avanie,
À cette vraie merveille un joli nom chrétien.
Bonvolu la ĉielo, ke iam, plej genie,
Poeto en inspiro, Pegaze subtenite*

Donacos, forviŝante jarcentojn da insultoj

Al vera ĉi ravaĵo kristanan lindan nomon.

Krom la neatendita «chrétien» en la postuloj de GB (fakte postulo de l' ri-mo!), strangas lia propra postulo, dum abundas la nomoj (ne ĉiuj aĉaj - male!) uzataj por nomi franclingve, familiare aŭ slange, la «veran ravaĵon», inter alie la plej oftaj: *chatte, minette, minou, foufoune, cramouille, moule...*

La plej uzata laŭ mi estas «chatte» (katino) kiu probable heredis sian apearon/uzadon de l' kuniklo mezepoke nomita «conil», kiu samtempe uziĝis por nomi la virinan seksorganon.

Tamen el tiu serio da nomoj nur la trilatera vorteto rilatas al la ingo (la vagino) dum la aliaj nur al la videbla parto (vulvo, familiare piĉo) aŭ eĉ ne vere al la sekso sed al la pubo, pli precize al la puba hararo.

Tio bone videblas ĉe la heraldikaj blazonoj, kie la virina sekso etas simbole bildigita sufiĉe krude per frukto granado, mature fendita tre «piĉ-forme».



Aliaj formoj, pli diskretaj, kiel ringoj aŭ ringformaj aĵoj estas uzataj (tamen ne ĉiam bildigante la piĉon), kiel ekzemple en la blazono atribuita al Jeanne d'Arc, kiu estas frandinda bildo por la disĉiploj de Freud...

Tiuj bildoj analogas kun la franclingvaj «piĉoj»: moule, cramouille (tiu lasta, trafa eltrovaĵo, kiu kombinas «cramoisi» (karmezina = brile malhelruĝa) kun «mouille» (malsekigas), kun «ouille» ĉe la fino, kiu aspektigas ne tre laŭda la vorton.

Kiam temas pri pubo, heraldiko uzas «renversitajn triangulojn» kiel tiu ĉi, sed ĉi bildigado estas sufiĉe rara.

Tiuj bildoj analogas kun la franclingvaj «poils pubiens»: chatte (kun ties francmodaj diminutivoj: minet, minou, minette, chagatte, touffe, foufoune...).



Kuriozaĵo:



Temas pri blazono de [Acuña](#) (Pedro Vázquez de Acuña y Albornoz), kiu bildigas sian nomon per naŭ «[cuña](#)» (kojno), kio ankaŭ proksimas al «cunnus»...

Konklude

Pro manko de Esperanta vorto kun duobla signifo kiel la franglingva trilitera vorteto, la traduko de ĉi kanzono restis nur deziro sen realigo...

Sergo Sir'



ESPERANTO EN BORDOZO: IOM DA HISTORIO...

Charles BRUNET (1875-1967)

Eble memoras vi pri tiu bildo el la resumo pri la historio de Esperanto en nia regiono prezentita okaze de nia festo por la 50-jariĝo de Esperanto-Gironde en 2018.

Charles Brunet kaj lia edzino Denise estis delegitoj de la Bordoza grupo en la unua Bulonja Kongreso en 1905.



Sciu, ke Christian Bernadat, pranepo de Charles Brunet, pretas partopreni en estonta kunveno de nia grupo por paroli pri sia praavo kaj ties familiaj postlasaĵoj. Christian Bernadat heredis diversajn materialojn, fotojn, artikolojn kaj originalaĵojn. Kaj verkinte familian rakonton, li dediĉis tutan ĉapitron al Esperanto.

En ĝi, vi eksciuj ekzemple, Charles verkis du «propagandajn» teatraĵojn, *On a souvent besoin d'un plus petit que soi* (1913) kaj *Le coup de foudre* (komence de 1920aj jaroj), en kiu rolludis lia filino Suzanne. Ĉi lasta edziniĝis kun Louis Bernadat en 1925 kaj naskis Roger en 1926.

Charles rapide amikiĝis kun Ludoviko kaj ankaŭ kun Lidja Zamenhof, kiu estis lia gastino en Bordojo almenaŭ tri fojojn en 1928, 1934 kaj 1935.

Soneto al Lidja Zamenhof
22an de junio 1933

*Ĉe lecion' l' unua, skeptikulo,
Kaptita estas tuj, per via scio...
Ĝi plu ne pensas; restas sen konscio,
Tutpreta kredi, al de Vi, formulo.*

*Lernardo por Ĝi estas ne... regulo
Sed dolĉa kaj plezura sensacio.
L' aplaŭdo fina post «Konversacio»
Vin pruvas, ja, l' esprimon de gratulo.*

*O, majstrfilino, kiu logas mensojn
Kaj akirigas kleron per amuzo;
Meritas Vi, de ĉiuj dankajn pensojn.*

*De l' lingvoj – lernigante – kvintesencon
Konkordon Vi liveras, sen konfuzo!
Ĉar donas Vi al Hom' la vortpotencon!*



En 1955 laŭ peto de la Groupe Espérantiste de Bordeaux, pro lia poema verkaro kaj liaj du teatraĵoj, Charles ricevas la honoran distingajon Palmes académiques.

Charles kun sia pranepo Christian Bernadat en 1955

Marcelo

MAURICE GENEVOIX FAVORA AL ESPERANTO

O kaze de la hodiaŭa enpanteonigo de la fama verkisto kaj tiama sekretario de la Franca Akademio, mi sendas al vi parton de intervjuo, kie li tutklare favoras Esperanton. Ĉu la nunaj akademianoj kuraĝus fari same? Mi dubas. O tempora, o mores!

Elvezio, la 11an de novembro 2020

M. Maurice GENEVOIX

Membre de l'Académie Française, espérantiste de cœur

Le 18 février 1955, l'éminent écrivain, M. Maurice Genevoix, membre de l'Académie Française, était interviewé à la Radio, sur la Chaîne Nationale, par M. Pierre Delaire.

Voici quelques extraits des réponses que le célèbre auteur de *Babouat*, M. Genevoix, fit aux questions posées par M. Delaire :



« Ce que je souhaite, et ce que je souhaite vivement, ce que je souhaite de tout mon cœur, c'est que les Nations se soucient d'abord de tout ce qui peut les rapprocher, de tout ce qui peut les amener à une compréhension et à une tolérance mutuelles — et dans ce domaine-là une seconde langue, vraiment internationale et commune, peut être — cela va de soi — d'extrême conséquence, d'une bienfaisance sans prix, pour les générations à venir... »

L'Esperanto n'est pas du tout une langue uniforme, une langue robot, mais, au contraire, une langue naturelle et souple...

« Je sais qui est Zamenhof, je sais que vous avez traduit des œuvres qui appartiennent au patrimoine de la littérature universelle et d'ailleurs vous devriez continuer dans cette voie... »

« L'Esperanto est en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment, elle est propre à permettre, par conséquent, l'expression la plus juste, la plus littéraire, la plus esthétique et de nature à satisfaire les esprits les plus ombrageux et les plus particularistes, et il ne peut pas porter ombre aux fidèles des langues nationales... »

« Puisqu'à force de conviction, de foi, d'efforts convaincus, vous avez déjà alerté les opinions internationales, puisque le nombre de vos adeptes va sans cesse se multipliant, puisqu'ainsi la question de l'Esperanto est à l'ordre du jour, vous êtes en passe de gagner... Il manque quelquefois au dernier moment l'impulsion décisive, ce que Lucrèce appelait le clinamen, mais cela, M. Delaire, c'est votre affaire précisément. Par ces temps atomiques de réactions en chaîne, c'est à vous, en somme, de déclencher cette chaîne-là. Bon courage donc, car celle-là au moins n'a rien pour nous effrayer, au contraire. »

XVII

MESAĜO DE IAMA MINISTRO PRI EDUKADO

Mi ĵus trovis alian "perlon" en la sama fonto, nome *L'espéranto en douze leçons* de Pierre Delaire (1955). Temas pri la aŭtografa mesaĝo de la tiam ministro pri nacia edukado, P. O. Lapie, al aŭtoro de la manlibro. Ĉu ni sendos ĝin al s-ro Blanquer?

Elvezio

Ministère de l'Éducation Nationale
Paris, le 26.8.1950
Le Ministre

Toute ma sympathie active
va aux Espérantistes dont
l'idéal rejoint la
volonté française d'une
communauté intellectuelle
entre les Nations
P. Lapie

« Toute ma sympathie active va aux Espérantistes dont l'idéal rejoint la volonté française d'une communauté intellectuelle entre les Nations. »

Signé : P.-O. LAPIE.

Cet autographe de M. P.-O. LAPIE, Ministre de l'Éducation Nationale en 1950, a été remis à M. DELAIRE, dans le but de favoriser la « Campagne pour la Vulgarisation de l'Espéranto ».

XIX

Kontraŭ fanatikismo Politiko de la neokupata seĝo



El urtikan.net,
«satira, libera
kaj sendependa
retejo»

NIAJ KURSOJ

**BONVOLU ATENTI PRI TIO, KE POVAS OKAZI MODIFOJ PRO LA NUNA EPI-
DEMIO. PREFERE TELEFONU POR KONI LA KONDIĈOJN DE LA KUNVENOJ.**

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collège. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

LA ĈASO DUM DEVIGA IZOLIĜO

La ĉasistoj profitis rajton malrespekti la devigan hejmezoliĝon cele eviti la proliferadon de la aproj, kiuj respondecas pri gravaj damaĝoj ĉe kulturoj kaj de la cervedoj problemaj por la arbaroj...

Siaflanke akiro de libroj estas restrikgita, limigante disvastigon de kulturo.

Nia printempa hejma deviga izoliĝo okazis en trankvila kamparo. Birdoj pepadis kaj neniu bruo konkurencis. Male en hodiaŭaj aŭtunaj hejmezoligaj tagoj, krom aŭtojn ni aŭdadis multajn pafojn tra la vitokampoj ĉirkaŭ nia domo. Kaj kedu min, ne nur aproj kaj cervedoj suferis la trafojn.

Marcelo, la 4an de novembro 2021

La ĉaso, tiu esenca kulturo...



Urtikan.net

Desegno de [Mutio](#) por [Urtikan.net](#)

© 2021

Ĉar LEGI estas VIA asoci-bulteno, gravas ankaŭ VIA kontribuo!



PRI LIBRO:
**EN TOUTE LIBERTÉ: UNE FAMILLE BUISSONNIÈRE
DE NATHALIE RIGAULT**

<http://www.esperanto-indre.com/spip.php?article507>


E speranto Indre sekvis ĉiujn itinerojn de Nathalie Rigault, akompanata de ŝiaj infanoj, unue tra Brazilo kaj due tra Francio per ĉevalo.

Membro de Esperanto Indre, Nathalie, Kompanino, kiu kunkantis en 2015 en Lillo kaj partoprenis en nia 50jariĝa jubileo, uzis Esperanton kiel komunikilon por renkontoj.

Malkovru ambaŭ ŝiajn vojaĝojn per ŝia franclingva libro **En toute liberté: une famille buissonnière**. Akirebla ĉe Association Esperanto Indre (**Maison des associations 34 Espace Mendes France - 36000 Châteauroux**), ĉe librairie Arcanes, por 18,90 € aŭ ĉe FNAC aŭ Cultura.

Malantaŭa kovrilpaĝo:

http://www.esperanto-indre.com/IMG/pdf/couverture_en_toute_liberte.pdf



EL LA FLORARO DE MARCELO...

Centaurea cyanus
Bleuet des champs
asteracoj



30-60cm
jun-okt - unujara

Cejano

Origine el proksima Oriento, cejano, kiel trudherbo, dissemiĝis tra la mondo dank'al gren-kultivado. Sed pro uzado de herbicido kaj sterko, ankaŭ pro rapida plugado de la stoploj*, ekde la mezo de la 20 jarcento ĝi forte regresis.



1 stoplo. Stumpigita trunketo de greno, restanta post la falĉado (PIV)

Centaurea cyanus
Bleuet des champs
asteracoj



30-60cm
jun-okt - unujara

Cejano

Cejano estis la kampoĥoro preferata de la prusa imperiestro Vilhelmo la 1a en la 19a jarcento. Tial ĝiaj kortanoj portis cejanon ĉe butontruo.

Cejano de 1967 estas nacia emblemo de Estonio simbolante reziston al komunismo. En 1969 okaze de Festo de la estonaj kantistoj, sovetaj aŭtoritatoj ruĝkoloro tinkturigis cejanojn por similigi ilin al socialistaj diantoj.



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

